**Interreta ligilo:** www.kla.tv/14297 | **Publikigita la:** 16.05.2019

# La hipokriteco de Macron pri la dramo de « Notre-Dame de Paris »




**La novaĵo de la incendio de « Notre-Dame de Paris » disvastiĝis fulmrapide en ĉiuj medioj. Tamen, la tutmonda funebra mesaĝo sur Twitter de la prezidento Macron havas ian postguston de hipokriteco, kiel rimarkas en artikolo Albrecht Müller, ekonomiisto kaj ĉefredaktoro de la kritika retejo « NachDenkSeiten ». Vidu mem.**

Vespere, la 15an de aprilo 2019, la novaĵo disvastiĝis fulmrapide en la medioj : la tutmonde konata katedralo « Notre-Dame de Paris » brulas. La incendio ekis en la subtegmento kaj jam detruis preskaŭ la tutan ĉarpentaĵon. Laŭ informoj de la franca gazetara agentejo AFP, okazanta restaŭrado povus esti kaŭzo de la brulego. Ankaŭ la pariza prokuroro supozas, ke la ruiniga brulego rezultis el akcidento. La franca ŝtatestro Emmanuel Macron per Twitter deklaris : « Kiel ĉiuj miaj sampatrianoj, mi malĝojas ĉivespere vidante bruli tiun parton de ni. » Ankaŭ la prezidento de la Eŭropa Konsilio Tusk, la usona prezidento Trump kaj multaj aliaj ŝtatestroj esprimis sian konsternon pri tiu brulego.
Albrecht Müller, ekonomiisto kaj ĉefredaktoro de la kritika retejo « NachDenkSeiten », suspektas ian hipokritecon en la deklaro de Macron. La 17an de aprilo 2019, Müller skribis en artikolo kun titolo « Dekoj da Notre-Dame estis detruitaj helpe de la milita apogo de Francio » : « Estas terure, ke la fama pariza katedralo suferis brulegon. Sed tutsame terura estis la detruo de gravaj kulturaj riĉaĵoj, almenaù samvaloraj, en Irako, Libio, Sirio, Jemeno kaj en multaj aliaj partoj de la mondo. Tiuj landoj suferis pro militoj de okcidentaj ŝtatoj, inter kiuj Francio, Usono, Britio kaj aliaj.
Ankaŭ la germana verkisto, ĵurnalisto kaj redaktoro Wolf Wetzel skribis en artikolo pri la agado de Francio en la detruo de Jemeno. Nun aŭskultu parton de lia artikolo kun titolo : « Notre-Dame : funebra laŭdo en formo iom malsimila »
De du tagoj, la informiloj plenas je ĝi, la bildoj fiksiĝas en niajn kapojn. Oni sentas la doloron, la perdon, la senpovecon. Senpoveco povi fari ion, vidi belaĵon multvaloran iĝi rubo kaj cindro. Temas pri la katedralo « Notre-Dame de Paris », kiu ekbrulis la 15an de aprilo 2019 […] Ju pli mi rigardas tiun tragedion, kaj tiujn malĝojajn vizaĝojn, des malpli tio kortuŝas min. Mia kompato malgrandiĝas. »

Ne nur en Parizo troviĝas Notre-Dame.

La saman tagon kun la brulego de Notre-Dame, ni eksciis pri la publikigo de « sekretaj » dokumentoj pruvantaj, kion la francaj registaroj ĉiam neadis : Ili konstante partoprenas en militkrimoj. Ili estas inter la plej grandaj provizistoj de armiloj por milito plej barbara. La franca industrio de armado kaj milito liveras al Saŭd-Arabio kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj la armilojn mem, kiuj fordetruas Jemenon jam de kvar jaroj. En artikolo de la 16a de aprilo 2019, diras Florian Rötzer, ĉefredaktoro de la retmagazino « Telepolis » : « La diskonigo, fare de enketaj ĵurnalistoj, en la nova platformo Disclose, de sekreta registara dokumento, kun plena dosiero rilatante la malpuran militon, rivelas, ĝis kia grado la franca registaro konsideras la aferon kun pragmatismo. Temas pri dekkvinpaĝa raporto, de septembro 2018, el la militaj sekretaj servoj : ĝi pritraktas la armilojn venditajn al Saŭd-Arabio kaj la Emirlandoj

ekde 2015, kiam komenciĝis la milito en Jemeno.

La raporto ankaŭ estis prezentita al Prezidento Macron en oktobro kaj ĝi montras, kie la francaj armiloj estas uzataj.

« De jaroj la franca registaro asertas, ke la armiloj estas uzataj nur por defendocelo kaj tute ne por militkrimoj. Sed konstateblas, diras Rötzer, ke Saŭd-Arabio kaj la Emirlandoj plu faras militkrimojn : ili bombardas civilulojn kaj blokas la eksteran helpon. Delonge UNo priskribas la situacion en Jemeno kiel la plej gravan humanitaran krizon, kun 7 milionoj da malsatuloj kaj 80 % de la popolo dependanta de ekstera helpo. »

« Preskaŭ nenio restas de tiu lando. Ne plu restas tie ŝtono sur ŝtono. Kiom ofte estis brulegoj tie ?
Sen preĝejo oni povas – tute bone – pluvivi, sed sen domo ?
Donacoj de centoj da milionoj da eŭroj estis promesitaj por Notre-Dame, por ke oni rekonstruu ĝin en Parizo, « simbolo de Parizo kaj de la nacio », « konstruaĵo por eterneco ». Ne por Jemeno. La brulego de la katedralo Notre-Dame estas akcidento. Kio okazas en Jemeno ne estas akcidenta, sed intenca… kaj tre monprofita. »

**de brm**

---

### Fontoj:

Fontoj :
https://www.nachdenkseiten.de/?p=51003&fbclid=IwAR1Cf6VeCAM5GmxYZFwvnLYtJgj4i6GXCysASUg9oiGpF_8m-QJnHJIYP8c
https://www.heise.de/tp/features/Frankreich-Waffenverkaeufe-fuer-den-schmutzigen-Krieg-im-Jemen-4400222.html
https://www.arte.tv/de/videos/086089-022-A/jemen-waffen-made-in-france/
https://www.srf.ch/news/international/brand-in-kathedrale-notre-dame-das-protokoll-der-ereignisse-zum-nachlesen
https://www.nzz.ch/panorama/notre-dame-sechs-antworten-zum-feuer-in-paris-ld.1475568

---

### Ankaŭ tio povus interesi vin:

#Francio - www.kla.tv/Francio

#EmmanuelMacron-eo - www.kla.tv/EmmanuelMacron-eo

---

### Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** www.kla.tv/abo-en

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** www.kla.tv/vernetzung&lang=eo

*Licenco:* *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.